



# BELGA KATOLIKO

Oficiala bulteno de la  
**BELGA KATOLIKA LIGO ESPERANTISTA**

(B. K. L. E.)

Nacia Sekcio de la **INTERNACIA KATOLIKA UNUIGO ESPERANTISTA**

(I. K. U. E.)

## JUNIO 1912

### ENHAVO:

Por la Paco. — Nia Tria. — Tria Internacia Kongreso de la Katolikoj Esperantistaj, Budapest, 22-23 de Aŭgusto 1912. — IIIa Internacia Kongreso de Katolikaj Esperantistoj, Budapest 1912. — Katolika vivo ĉiulanda. — La 4<sup>a</sup> Belga Esperantista Kongreso en Gent. — Anonima Akcia Societo: « Internacia Eldona Societo: Espero Katolika ». — Kroniko de I. K. U. E. — Opinio de Protestanta Sciencisto pri la Jezuitoj. — Miksaĵoj el « Espero Katolika ». — Rigardu la Sanktan Hostion. — Notinde. — Frato Izidoro.

**REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO**

Ce LEO HEIDENDAL

**A R E N D O N K**

# BELGA KATOLIKO

ORGANO DE  
LA  
Belga Katolika Ligo Esperantista  
(B. K. L. E.)



NACIA SEKCIO DE LA  
Internacia  
Katolika Unuiĝo Esperantista  
(I. K. U. E.)

REDAKCIO: Por ĉio kio koncer-  
nas la redakcion (artikoloj —  
informoj — broŝuroj — libroj —  
k.t.p.) oni sin turnu al:

ADMINISTRACIO: Por ĉio kio  
koncernas la administracion (re-  
klamoj — mensejoj — anoncoj  
— k.t.p.) oni sin turnu al:

Sro Leo Heidental, ARENDONK.

## POR LA PACO.

R. P. Linnebank, la favore Konata Neder-  
landa literaturisto, skribis jenan belan arti-  
kolon al la « Getrouwe Maldegem » (La  
fidela Maldegem, eldonisto S<sup>r</sup> Viktor De-  
lille); ĝi certe meritas ke ĝi « estu kiel eble  
plej disvastigata. » La titolo estas:

Por la Paco.

La kvaran de Julio de la pasinta jaro estis  
fondata en la Kampodomo de la Ŝtatministro  
Beernaert en Boschvoorde (apud Bruselo)  
la internacia Ligo de la Katolikaj Pacifistoj.  
Beernaert fariĝis honora Prezidanto; Prezi-  
danto, Melot, belga reprezentanto, kaj unu  
el la subprezidantoj estas Lia Moŝto Kardi-  
nalo Bourne.

Tiu Ligo celas naski inter la katolikoj  
de l'diversaj Eŭropaj landoj fortan movadon  
por la Paco. En Francujo kaj svisujo ĝi  
havas jam vivoplenajn sekciojn; same en  
Belgujo, kun propra organo kaj kun multaj  
anoj de la du Ĉambroj, kaj de la universitat  
profesoroj; en Anglujo je la komenco de ĉi  
tiu monato (aprilo) estis fondata nova sekcio  
kun multe da solenaĵoj; en Nederlando ankaŭ  
oni ekagadis sur la reprezentantojn de am-  
bau aŭtoritatoj por starigi katolikan Paclig-  
on tiel bonsukcese, ke, antaŭ nelonge,  
la plano estos efektivigata. Oni disdonas  
cirkulerojn, kunigas kunvenojn por klarigi  
la celon, la rajton, kaj la necescon de tiu

Ligo, solvi kaj forigi la malfacilaĵojn kaj  
objekciojn.

Kion celas la Pacmovado aŭ Pacifismo?  
— Antaŭ ĉio, la Pacmovado ne estas mova-  
do *kontraŭ la militistaro*. — Ne kontraŭ  
la militistaro sed *kontraŭ la milito*. La  
ŝtatoj devas havi konvenan armeon, por ke  
ili povu konservi la internan ordon en la  
lando; kaj, tiel longe ke ekzistas popolo kiu  
al si rezervas la rajton uzi perforton por  
atingi siajn celojn, ĉiu ŝtato devas esti sufiĉe  
potenca por defendi sin per kirasitaj pugnoj.  
*Kontraŭ la milito*, kiel kaŭzo de suferado,  
funebro kaj pereoj; kaj, eĉ en pactempo —  
pro la multekosta preparado — de malfeli-  
ĉaĵoj. Kontraŭ la milito precipe, pro tio ke,  
kiel ĝin volas nun la internaciaj moroj, ĝi  
estas morala malbonaĵo, tial ke la milito per  
si mem ne kondukas al la rajto, ĉar la milito  
naskas malkonsenton, malamon, kaj ven-  
ĝemon.

\*\*\*

Ĝis nun la interpopolaj malpacoj estis  
decidataj per la batalo. Kiu estis pliriĉa,  
pliforta, tiu venkis. La pacifistoj neas ke  
ekzistas rajto de la pliforta, kaj, ke la po-  
pulo, havanta la pli multnombrian militista-  
ron, estas pro tio ĉiam rajtprava. Ili volas  
ke la justeco kaj morala leĝo povu regi la  
internaciajn rilatojn; ili pretendas ke kiel la  
moralleĝo valoras inter individuoj, tiel an-  
kaŭ — kaj la sama, nome tiu de la Evange-  
lio — valoras por la Ŝtatoj; ili diras ke ĉiu  
popolo havas la rajton disponi mem kaj per

si mem pri sia rajtaro; ili do neas la rajton admiliti; ili envokas la homan fratecon, — ili ne akceptas heredmalamikojn nek malamon inter rasoj, — la plifortaj popoloj estas, laŭ ili, rilate la pli malfortajn, kiel la plifortaj kaj pli maljunaj fratoj en familio estas rilate la plijunajn.

En okazo de minacantaj interbataloj, la Ŝtatoj devas esti kondukataj al la paco, al la pacjuĝejo, al la juĝantarejo, por ke la rajthavanta obtenu rajtgaŝnon.

Fundamento por la paco devas esti kaj fariĝi: la internacia juĝado, la internacia juĝistaro, la paciga juĝantaro. Laŭ tiu spirito la Pacifistoj klopodas agi sur la publikan opinion kaj, per ĉi-tiu, influu sur la registarojn. Ili celas konduki la registarojn al tio: ke ĉi-tiuj *volu* uzi la Hagan arbitran juĝkortegon.

Ĉu do la Pacifistoj pensas ke ili povos anstataŭi la mondon per Paradizo kun eterna paco? — Ne; sed ili kredas ke la milito povas kaj devas foriri kaj foriĝi, kiom ĝi estas rajtinstitucio kaj rajttrivedo; ili estas konvinkitaj ke povas veni tempo, kiam la milito povas esti ŝatata *tia*, kia ĝi estas efektive: malbonfaraĵo. Niaj pra-avoj, la pra-Germanoj decidis ĉiun malkonsenton per la hakilo; nun ankoraŭ sentaŭguloj facile ekprenas la tranĉilon. Sed tio estas kontraŭlegaj farmanieroj, kaj, kiel tiaj, ili estas, ankaŭ nuntempe, punataj. Neniu povas esti sia propra juĝisto; la malkonsentaj devas esti juĝataj en la juĝistejo. Nu, kio estas leĝo por la individuoj, tion la Pacifistoj volas ankaŭ esti leĝdeviga por la popoloj: la juĝistejo. En internacia kampo ni vivas ankoraŭ en stato de anarĥio kaj barbareco; ĉar internacia aŭtoritato ne ekzistas. « En literaturo, diris la Prioro de la Domenikanoj de Leicester, Mac Nabbe, en la pacifista kongreso en Londono, « en literaturo la moderna mondo estas tie kien Dante kaj Shakespeare ĝin metis; koncerne la arbitran juĝadon, ĝi agadas kiel la lupoj kaj la ŝakalo — ĝi envokas nur la brutan perforton por aranĝi malkonsentojn. Preskaŭ ĉiuj popoloj pretendas ke ili estas superregaj: ili ne akceptas ian aŭtoritaton super si mem, ĉu materian ĉu moralan; same kiel en la pratempo, la

« perforto solvas la malfacilaĵojn. La pacifistoj celas ke la popoloj faru la saman antaŭeniradon ol la individuoj: deviga internacia arbitrado. »

\*\*\*

Kion la katolikoj devas fari en tiu pacmovado! Se la doktrinoj de la ne-katolikaj Pacifistoj disigitaj sur la tuta mondo, aŭ kunigitaj en Ligojn, estas laŭ la Evangelio, konsentas kun ni katolikoj; ni aliĝu kun ili por plifortigi ilin per la forto de nia katolikismo. Ilia paco ne estas tia kia la antikvoj Romanoj ĝin deziris: unu nacio reganta la alian kaj deviganta al la paco. Ilia paco havas kiel fundamenton, la respekton de la rajto de ĉiuj, eĉ de la rajto de la malpli forta, la fundamenton de la homa frateco. Ilia paco estas do kristana paco, kaj eble neniam divenetus tian pacon, se la Dio-Sinjoro sur la monto ne dirus: « Feliĉegaj estas la dolĉanimuloj; feliĉegaj estas tiuj kiuj malsatas kaj soifas la justecon; feliĉegaj estas la pacemuloj. »

Krom tio, — ĉu la religio ne estas deviganta, ne same taŭgas por la komunumo ol por la individuo? Kaj ĉu oni ne devas obei la moralon de la Evangelio en la reciprokaj rilatoj de la Ŝtatoj same ol de la apartaj personoj? Ĉu do ni nun, kiam temas la ŝanĝo de tiuj rilatoj, la organizo de la estantaj popolinterrilatoj, ne devas agadi, se ni ĝin povas, ke tiuj ŝanĝoj kaj rilatoj estu konsentaj kun la kristana moralo!

La kristanismo ne mortis; la kristanismo vivadas, kaj devas vivi. La idealo de la katolikaj Pacifistoj estas jena: Restaŭrati la popolarajton sur la fundamento fiksita de la mezjaraj grandspirituloj kaj la unuaj fondistoj de la internacia rajto. Tiu fundamento ne estas alia ol la kristana morallego.

En 1869 ĉe la komenco de la Vatikana Koncilio — ĝis nun ne finita, sed ja nur haltigita — Angla Protestanto David Urguhart, sendis petitajon al la Papo, por ke Li denove fiksu la popolarajton. La Prelatoj, (pli ol Kvardek Ĉefepiskopoj kaj Episkopoj) petis ke tiu demando estu pritraktota en la Koncilio.

Papo Pio X<sup>a</sup> en respondletero al la adresaĵo de la Milana packongreso en 1906 kla-

rege dircertigis ke Li treege interesigas je la Pacmovado, dezirante ke ĝiaj klopodoj estu sukcese kronataj. Kaj en Julio de 'l pasinta jaro Nia Sankta Patro skribis al la Apostola Delegito en Usono: « Verege, « preparadi la paciĝon de l' Spiritoj, trankviligi la militdezirojn de la tiel dirata *Aŝmita Paco* — tio certege estas nobla tasko; kaj kiu ajn kunlaboras por ties efektiviĝo — eĉ se li ne tuj kaj plene atingas la deziratan celon — helpis tamen al nobla klopodaĵo kiu estas laŭdinda; kaj ĉiu kiu kunlaboras kun tiu klopodaĵo, faras servon al la socio. Tial mi preĝas al la Sinjoro ke li asistprotektu la laborantojn por asekuri la pacon al la popoloj ».

Kiam baldaŭ sonos la alvoko por la Pacmovado en la Katolikaj Nederlandoj — la Pacmovado, tiu eminente kristana faro — niaj gazetoj apogu tiun alvokon per komuna rezonado; Ĉiu pereiga kaj aprioria kondamno restu malproksime; sed oni kunlaboradu sentime kaj honeste, porke iutage estu klarvidata la vero de la parolo de 'l materialisto Novikow: « La Katolika Eklezio povas pli influi la mondpacon ol ĉiuj Pacifistoj kune.

H. LINNEBANK.

Uden, en la printempa monato, 1912.

Kun afabla permeso de l'aŭtoro kaj de l'eldonisto el flandra lingvo tradukis.

KIVO ZOERSEL

N. B. — Ĉiuj niaj gelegantoj kiuj deziras aliĝi al la « Belga Katolika Ligo por la Paco » devas sin turni al D<sup>ro</sup> Emile Valentin, 186, Avenue des Fleurs Bruselo. Jaro kotizo fr. 1. Ke ili aliĝu kiel Esperantistoj. Tio faros bonan propagandon por nia movado.

B. K.

---

## NIA TRIA.

---

KOMUNIKAĴO DE LA PREZIDANTO DE I. K. U. E.

Sinjoro Redaktoro kaj Kara Amiko,

Mi ĵus ricevis bonegajn novaĵojn de Mrg. Giesswein, la estonta Prezidanto de la « TRIA Katolika Internacia Kongreso Esperantista en Budapest. »

Tiu Eminentia Prelato antaŭ nelonge vizitis Romon, kaj ĝuis specialan aŭdiencon kun Nia Sankta Patro Lia Papa Moŝto Pio Xa. Mrg. Giesswein kaj Mrg. Giambene, lerta Esperantisto kaj nia malnova kaj ĉiam fidela helpanto dum pli ol 12 jaroj apud la Sankta Seĝo, sciigis al la Papo la programon de la estonta Kongreso en Budapest, kaj petegis por ĝi la Apostolan Benon, kaj religiajn favorojn, similajn al tiuj kiujn oni donacis al niaj du antaŭaj kongresoj en Parizo kaj Hago.

La Sankta Patro atente aŭskultis kaj tiam altigante siajn brakojn li ekkriis « Al la Esperantistoj, la Apostolan Benon ». Poste li ordonis al Mrg. Giambene, kiu posedas la altegan situacion de Prelato — « Sostituto » de la Sankta Kongregacio de la Indulgencoj, prepari la Reskripton por nia Kongreso kaj transdoni ĝin al Mrg. Giesswein. Tiu multvalora dokumento estas jam verkita kaj inter la manoj de la Prezidanto de la Tria. Pli malfrue ni havos la plezuron doni al niaj legantoj Esperantan tradukon de ĝi.

Mrg. Giesswein esprimas la deziron ke multaj Belgoj ĉeestu Budapest. Jen kelkaj detaloj de 11 donitaj kiuj certe vekos ĉe multaj la deziron partopreni en tiu belega Familia Festo de la Katolika Esperantistaro.

1<sup>e</sup> — La Aŭstria Fervojaj Societoj proponas fari tre gravajn rabatojn al la Kongresantoj.

2<sup>e</sup> — La Organiza Komitato jam faris bonegajn aranĝojn por loĝi kaj nutri la Kongresanojn. Granda Katolika Kolegio prezentas loĝejon — prekaŭ senpage — al 100 viroj kaj aliparte por 50 Sinjorinoj au Fraŭlinoj. Por gekongresanoj kiuj vojaĝos kune, oni preparos tre malkarajn loĝejojn en komfortaj hoteloj kaj pensionoj.

3<sup>e</sup> — La Kongreso Oficiale malfermos je la 19<sup>a</sup> de Aŭgusto, tiel la kongresanoj povos ĉeesti la mirindan nacian Hungaran Feston kiu okazos je la 20<sup>a</sup> de Aŭgusto. Plue, nia TRIA koincidas kun la Hungara Nacia Esperantista Kongreso al kiu kunvenos multaj alilandanoj. Ni povas do antaŭvidi ke okazos en Budapest, de la 19<sup>a</sup> de Aŭgusto ĝis 27<sup>a</sup> vera internacia Kongreso, des pli ke la Oka Kongreso en Krakovo finiĝos je la

18<sup>a</sup> de Aŭgusto, kaj multaj Kongresanoj profitos je la okazo viziti Budapest, kiel post kongresa ekskurso.

4<sup>e</sup> -- La provizora programo, kiu estas ankoraŭ ne kompleta, certigas tamen al ni ke nia TRIA estos tre interesa. Pri la reunuiĝo de la Kristanaro parolados Katolika Pastro de la Greka Rito, Abato Johano Kozma el Mezozombor, pri la nuna stato de la Orientaj Eklezioj, kaj la movado al reunuiĝo kun la Sankta Seĝo. Multaj Georatoroj el Germanujo, Nederlando kaj Francujo pritraktos la antialkoholisman movadon. Aliaj temoj pritraktotaj estas: la defendo de la Eklezio kaj de ĝiaj Ministroj kontraŭ la atakoj de la framasonaro kaj aliaj sekretaj societoj. Sro. Claudius Colas parolados pri internacia unuiĝo de la Katolika Gejunularo, kaj la Katolika fako de Boy Scouts.

Ni, do, varme admonas niajn gekatolikajn legantojn profiti je tiu unika okazo por viziti facile kaj malkare, tiun rimarkindan civiton Budapest, kiun oni nomas la Pordego de la Oriento. La kongresa karto kostas nur 2 Sm. = 5 frankoj.

Por ĉiuj informoj sin turnu al la Sekretariino Sinjorino Karlino Manglitz, Budapest, IX, Ullöi, ut 59.

Akceptu Kara Redaktoro, la certigon de mia tutkora estimo en Jezu kaj Maria.

AUSTIN RICHARDSON,  
Prezidanto de I. K. U. E.

### Tria Internacia Kongreso de la Katolikoj Esperantistaj, Budapest,

22—23 de Augusto 1912.

#### Unua Cirkulero.

La loka Organiza Komitato atendis ĝis nun, por eldoni la unuan cirkuleron, kiam ĝi povas jam raporti pri la forigo de ĉiuj malhelpoj, pri plenumitaj taskoj, unuvorte kiam ĝi povas prezenti rezultatojn.

*Organiza Komitato.* Por la organizado de la kongreso fondiĝis Loka Komitato, kiu kunigas en si reprezentantojn de ĉefpastraro, scienco, politiko, esperanta movado. Prezidanto estas Lia Prelata Moŝto D-ro Aleksandro Giesswein, parlament-delegito, prezidanto de Hungarlanda Esperanta Societo, de Hungara Pacifista Societo,

de Tutlanda Lerneja Komitato. Ĉefsekretario: dr. CYRILLO VÖRÖS. Administranta sekretario: Karlino MANGLITZ (adreso: Budapest IX, Ullöi ut 59.) Komitatanoj: univ. prof. dr. Johano KISA, dr. Stefano ZSEMBERY, direktoro de la Hungarlanda Katolika Federacio, Tiborco Révay, ĉefepiskopa sekretario, dr. advokato Julio BARANSKY, membro de la ĉefurba Magistrataro k. t. p.

*Protektado.* Lia Kardinala kaj Princa Moŝto Klaŭdio VASZARY, primato por Hungarlando, kaj Lia Ĉefepiskopa Moŝto Johano CSERNOCH bonvolis akcepti la altan protektadon de la kongreso.

*Diservo.* Okazos solena diservo, pri kiu la dua cirkulero donos detalojn.

*Kongresurbo.* Laŭ feliĉa elekto de la Dua, la kongreso okazos en Budapest, ĉefurbo de Hungarlando, do en urbo, kiu estas centro de lando, kie renkontiĝas Oriento kaj Okcidento. Sudo kaj Nordo.

*Gvidlibro* pri Budapest. Post kelkaj semajnoj aperos ilustrita luksa gvidlibro pri la kongresurbo. Ĉiu aliĝinto ricevos ĝin senpage.

*Kongreskarto.* La komitato fiksas la kongreskotizajon je kvin kronoj (Sm. 2.—). Familianoj pagas la duonon.

*Loĝado.* Al al komitato sukcesis jam nun zorgi pri preskaŭ senpaga loĝejo por pli ol cent sinjoroj kaj kvindek sinjorinoj. Krom tio komisiono zorgos pri malkara kaj komforta loĝejo por ĉiu kongresano, laŭplaĉe en hotelo aŭ alie.

*Datoj de la kongreso.* La kongreso komenciĝos la 22 — an aŭ 25. — an de aŭgusto kaj daŭros almenaŭ tri tagojn. La definitiva dato de la komenco dependas de la interkonsento kun la krakova organiza komitato.

*Pri ferrojaj rabatoj, amuzadoj, ekskursoj, teatraj prezentadoj* estos komunikataj detaloj en la pluaj cirkuleroj.

Entute la komitato certigas koran akcepton, amikan gastamon.

LOKA ORGANIZA KOMITATO.

## IIIa Internacia Kongreso de Katolikaj Esperantistoj. Budapest 1912.

### IIa CIRKULERO.

*Gridlibro.* Aperis luksa ilustrita gvidlibro tra Budapest. Mendebla per la redakcio de La Verda Standardo, Budapest, IX Üllői ut 59, por du respondkuponoj la Kongresanoj de la Tria ĝin ricevas senpage.

*Apostola Beno.* Nia Presidanto S-ro. D-ro Aleksandro Giesswein, antaŭ kelkaj semajnoj vizitante Romon, ricevis de Lia Papa Sankteco la Apostolan Benon kaj Indulgencon por la partoprenontoj, de nia Tria. *La Tagoj* de la Tria ankoraŭ ne estas tute precize fiksitaj, tio dependas de la fikso programo de la Oka.

*Alveno al Budapest.* La plej multo de niaj gastoj partoprenos ankaŭ la Okan, kaj la ekskurson al Zakopanje, tial la Organiza Komitato aranĝos la alvenon per veturiloj el Zakopanje al Hungarlando ĝis Barlangliget. Kiuj ne volas partopreni tiun ekskurson, sciigu la Organizan Komitaton pri la tago de sia alveno al Budapest.

*Tri preskaŭ senpage* loĝejoj estas jam zorgite. Kiuj venas direkte al Budapest, povas ricevi la saman loĝejon ĉi tie jam antaŭ la Kongreso. Rimarkinde estas, ke la 20-de Augusto estas granda hungara nacia kaj eklezia festo.

*Programo.* La unuan tagon matene okazos Diservo kaj prediko en la universitato preĝejo, autautagmeze solena malfermo de la Kongreso kun la malferma parolado de la prezidanto de la Tria D-ro. A. Giesswein.

*Ĉefpunktoj de la programo.* La Societo apologia. La terminoj teologiaj kaj ekleziaj en Esperanto. Pacifismo kaj Esperanto. La kontraŭalkohola movado en diversaj landoj. La unuiĝo de la Kristanaro precipe rilate al la Orienta Eklezio. La Scienco kaj Esperanto.

Oni petas la partoprenontojn sendi la aliĝilon kaj skribi la tagon de la alveno kiel eble frue, precipe se iu deziras uzi la suprediritan malmultekostan loĝejon.

Loka Organiza Komitato.

## Katolika vivo ĉiulanda.

La 23-a Internacia

EUKARISTIA KONGRESO en WIEN.

12-a—15-a de Septembro 1912.

KELKAJ DETALOJ.

La preparaj laboroj por tiu ĉi grandioza festo de tutmonda katolikaro bone progresas kaj la partopreno el ĉiuj landoj estos granda. El *Britujo* ĝis la komenco de Marto jam 800 personoj mendis loĝejojn en hoteloj k. a., el *Belgujo* 500, el *Pariso* 300. Angloj, Francoj, Amerikanoj rezervigis por si apartamentojn en la grandaj hoteloj sur Ringstrato, kie unu ĉambro kostas 10 Sm.

Anoj de *ĉiuj nacioj en Aŭstrio* partoprenos en la granda procesio, multaj el ili, kaj ankaŭ alinacianoj, en *nacia kostumo*. Nur el *Kroatujo* 4000 viroj jam estas anoncigitaj kiel partoprenantoj.

Por *Hungaroj* du preĝejoj, por anoj de *fremdaj katolikaj ritoj* unu preĝejo estas rezervitaj. En tiu la ĉefepiskopo de *Lvovo* (Leopoldo) diros solenan meson.

Tre interesa estos ankaŭ la *muziko* en la preĝejoj dum la Diservoj. Oni aŭdos dum la unua tago *Gregorianajn ekleziajn kantojn* el la kvina centjaro, dum la dua komponaĵojn de *Palestrina*, dum la tria tiujn de HAYDN kaj de MOZART.

*Dek militistaj muzikistaroj kunigitaj* ludos dum la festa meso okaze de la procesio. *Kantistoj* de la katedralo de S-ta STEFANO kaj 400 kantistoj el la misiista instituto S-ta GABRIELO kantos la *specialajn komponaĵojn por Eŭkaristiaj Kongresoj*, kiujn la abato de Benediktanoj en *Emaus* konservas. Ankaŭ la muzikistaro de la Sales'anoj de Don Bosco en *Trieste* (70 muzikistoj) partoprenos.

La *ministrestro* kaj la *provincestro* permesis uzi *salonojn* en siaj palacoj por la celoj de la kongreso. Laŭ permeso de la tronheredanto, la arĥiduko FRANCISKO FERDINANDO, *centra oficejo* en la nova imperiestra palaco estos establita por kolekti la *ekleziajn objektojn* prunte donitajn por ja ekspozicio k. a.

Vere kortuŝanta estos grandioza *komuna komunio* de 20,000 infanoj en la grandega

parko de la palaco de l' princo *Schwarzenberg*.

*Ĉiuj demandoj* pri la kongreso estu direktataj al la *Centra Oficejo de Eŭkaristia Kongreso, Wien, I. Stefansplatz 5*, ankaŭ per Esperanto. *Fidindajn informojn al Esperantistoj* sendas S-ro JOH. SCHRÖDER, *L. K. redaktoro, Wien, VII Kaiserstrasse 10*.

*Venu, ni adoru!*

(Oficiale Komunikita.)

### Katolika Junularo.

Oni intencas okazigi internacian kunvenon de la kristana junularo dum la Eŭkaristia Kongreso en Wien. S-ro KARLO WESELY, sodalis Marianus, Wien XXI, Schenkendorf-gasse 35/10 (Aŭstrio) petas sendi al li adresojn de katolik-junulaj Unuiĝoj el ĉiuj landoj.

## La 4a Belga Esperantista Kongreso en Gent.

La 26an kaj 27an de Majo, je la Pentekosta festo, okazis tiu sukcesplena Kongreso en la belega Ĉefurbo de Flandrujo Orienta.

Du cent kvardek ses (246) Kongresanoj el diversaj partoj de Belgujo, kelkaj fremdaj gesamideanoj el Francujo, Holando, Anglujo kaj Germanujo kunvenis, kaj donis al la Kongreso veran internacian aspekton.

Tiel kiel en Brugo kaj en Charleroi, okazis frumatene, Diservo por la Katolikoj Dimanĉon je la 8,30a, dank' al la afableco de la Resp. Patroj Jezuitoj, pli ol cent personoj kunvenis en bela Kapelo de la « Résidence » Assaut strato 32. Abato Austin Richardson diris la Stan. Meson kaj predikis Esperante. Lia teksto estis la vortoj de Sta. Paŭlo al la Romanoj « *La Regno de Dio estas paco kaj ĝojo per la Sankta Spirito* ». La celo de la predikanto estis elmontri ke la Regno de Dio sur la tero, t. e. la Sankta Eklezio, ĝuas la pacon kaj ĝojon, unuvorte, la plej perfektan unuecon, dank' al la ĉiama agado de la Sankta Spirito, kiu estas ĝia animo, la principo de ĝia supernatura vivo. Sed, kvankam pri dogmoj kaj disciplino tiu unueco estas perfekta, tamen la praktikaj interrilatoj inter la

infanoj de la tutmonda Eklezio estas ofte malhelpitaj pro la terura barilo de la diverseco de la lingvoj. Do, diris la Predikanto, ĉar laŭ la Sankta Skribo ĉia bona donaco alvenas de Dio, ĉu ni ne povas pie kredi ke nia kara lingvo Esperanto estas, inter la manoj de la kristana popolo, rimedo por disvastigi pli kaj pli la Regnon de Dio, rimedo por interrilatigi pli kaj pli la diverslandajn Katolikojn? Li citis kiel ekzemplon la mirindan sukceson de niaj du Katolikaj Kongresoj en Parizo kaj en Hago, kaj kelkajn konvertiĝojn jam faritajn dank' al interrilatoj ebligataj per Esperanto.

Sinjoro Heidendaŭ, la agema Sekretario de la Belga Katolika Ligo, kaj Redaktoro de « BELGA KATOLIKO » ĉeestis la Kongreson kaj faris sindonan propagandon. Li sukcesplene paroladis antaŭ niaj Flandraj anoj pri la ĉie en Flandra parto konata batakanto « *Zij zullen haar niet hebben, De Schoone ziel van 't kind* ». Tiu kanto kies aŭtoro estas J. L. Lavrijsen el Arendonk, estis kantita ĉie dum la granda batalo pri la leĝdononta balotado. Eble en la plej proksima estonteco ĝi iĝos la batakanto Internacia de la Katolikoj.

Je la 9,30a la Kongresanoj kunvenis ĉe la Borso, kaj tuj piediris are, kondukitaĵ tra la stratoj de la antikva urbo per ĝoja Fanfaro kaj belaj Standardoj, ĝis la bela Urbdomego. Tra kelkaj stratoj oni vidis verdajn flagojn kaj banderolojn montrantajn la vortojn: « *Bonvenon Geesperantistoj* ». En la granda Halo de la Urbdomego, la Skabeno por publika Instruado, S-ro. De Weert, varmege akceptis la kongresanojn je la nomo de la Urbeŝtaro. Post kelkaj vortoj de S-ro. Albert Maertens, honora Prezidanto de la Genta Grupo, la S-ro. Skabeno deziris sukceson al la Esperanta movado, li certigis pri la simpatio de la Urbaŭtoritatoj por la Internacia Lingvo. Poste, S-ro. Witterijck, Prezidanto de la Belga Ligo, respondis kaj kore dankis la Gentan Urbeŝtaron pro ĝia aminda akcepto de la Kongreso. Fine, laŭ la bona Belga kutimo oni prezentis al la ĉeestantoj la « *Vino je honoro* ». Tiam la Kongresanoj reiris al la Borso kaj tie, en la granda Halo, okazis la Ĝenerala kunveno de la « Belga Ligo ». Pro la Oficiala raporto de tiu grava

kunveno ni petas niajn legantojn sin turni al la proksima numero de « Belga Esperantisto » la organo de nia nacia Esperantista Ligo.

Ni nur aldonas ke je la fino de la kunveno okazis bonega Festeno en alia halo de la Borso. Oni faris dum la manĝado pli ol 15 kostojn je le honoro de la Reĝo, de la Majstro, de la Genta Urbeŝtaro, de la alilanduloj k.t.p.. Dum la posttagmezo oni vizitis la ĉefajn vidindaĵojn de la Urbo, unu el la plej artplenaj civitoj de Belgujo. Vespere je la 8,30a, okazis granda Kant-kaj Drama Festo en la Teatro Minard.

Je la pentekosta lundo la Kongresanoj vizitis matene la mondfamajn ĝardenojn de Gentbrugge, kaj dum la posttagmezo oni faris ĉarman ekskurson vaporsipe sur la rivero « Lijs » kaj jam malfrunokte fine disiĝis la 4a Belga Esperantista Kongreso. Ni ne dubas ke ĉiuj Kongresanoj konservos longatempe la memoron de tiu tre gaja kaj sukcesplena nacia Kongreso.

ARO.

— X —  
Anonima Akcia Societo :

• Internacia Eldona Societo :  
Espero Katolika »

Direktoroj :

D-ro SMULDERS, redaktoro.

S-ro Fr. SLEIJFFERS, administranto.

Komisarioj :

S-ro FRANS KNAAPEN, prezidanto.

S-ro H. HÖFELER, sekretario.

S-ro H. B. VAN ZWET.

Ĉefa Eldono :

• *Espero Katolika* »,

Internacia monata revuo, oficiala organo de I. K. U. E. Religia direktoro : P-ro A. RICHARDSON.

Ĉar la reĝina aprobo de la Statutoj alvenis la 30an de Aprilo, la **Statutoj kaj la akciaj paperoj** ne povis esti pretaj la 1an de Majo. La akciuloj ilin ricevos kiel eble plej baldaŭ.

**Adresoj de E. K.** De nun oni sendu ĉion koncernantan la *redakcion* al D-ro SMULDERS, Schijndel, Nederlando, kaj ĉion koncernantan la *administracion* al S-ro Fr. SLEIJFFERS, Prins Hendrikstr. 93, Den Haag (Hago), Nederlando.

**Novaj akciuloj.** Tiuj, kiuj ankoraŭ deziras aĉeti akciojn kun rajto partopreni al la *Ĝenerala Kunveno* de akciuloj jam dum « Nia Tria » en Budapest, bonvolu sendi la akcian monon (60.50 nederlandajn guldenojn) al la administracio, kiu ankaŭ donos ĉiujn deziritajn informojn. Ni atentigas speciale al art. 6 de la statutoj :

La Societo akceptas nur *unu* posedanton po ĉiu akcio.

Se iu Esperantista Ligo, Societo aŭ Sekcio, ĉu kiel tia per kontribuoj, el sia kaso, ĉu per siaj anoj individue kun personaj kontribuoj, deziras partopreni en la Societa kapitalo, tio estos ebla laŭ la jena maniero :

La prezidanto de tia Ligo, Societo aŭ Sekcio fariĝos akciulo ; ĉe la « jenomigo » de la akcio, sur ĝi estos skribe aldonite, ke li estas akciulo en sia kvalito de prezidanto ; la Akcia Societo tamen akceptas kiel posedanton de tiaj akcioj *nur* kaj *ekskluzive* tiun prezidanton ; la Akcia Societo ne havas iun respondecon rilate al la aranĝoj faritaj inter tiu prezidanto unuflanke, kaj la Ligo, Societo aŭ Sekcio de li reprezentata aŭ iliaj anoj, aliflanke.

Ĉar estas dezirinde, ke la Akcia Societo estu kiel eble plej internacia, ni esperas, ke precipe aĉetos akciojn personoj el landoj, kiuj ne ankoraŭ estas reprezentitaj.

**Junia kunveno de komisaraj kaj direktoroj ; ĝenerala kunveno de akciuloj en Augusto 1912.** En art. 17 de la statutoj ni legas i. a. :

Komisaroj unufoje ĉiujare kunsidos inter si, antaŭ la 15a de Junio ; kaj post finiĝo de tiu kunsido ili denove kunsidos kune kun la Direktoroj . . . . .

En art. 20 ni legas, ke la ĝenerala kunveno de akciuloj estas difinita i. a. por :

D. la pritraktado pri aliaj temoj, kiuj de la Komisararo post interkonsiliĝo kun Direktoroj, estas metitaj sur la agendon.

La akciuloj do, kiuj deziras preparoligi iun demandon pri E. K. dum tiu Junia kunveno de komisaraj, kaj direktoroj ; aŭ kiuj deziras metigi ĝin sur la agendon de la ĝenerala kunveno, skribu **antaŭ la unua**



de Junio 1912 al la Prezidant-komisaro, S-ro Frans KNAAPEN, Tilburg (Nederlando).

**Komisiono pri Organizado de I. K. U. E.**  
(Vidu E. K. Okt. 1911 (N-ro 78) p. 243 k. s.)

Tuj post starigo de la Akcia Societo *Espero Katolika*, mi sciigas al la membroj de supre nomita komisiono kaj al la legantoj de E. K., ke mi, pro la multego da laboroj por la starigo de la Akcia Societo, la redaktado de E. K. kaj la senfina korespondado, ne havis tempon ne nur por verki la regularon de I. K. U. E., sed eĉ por simple *pensi* pri tiu afero. — Ĉu nun post la grava laboro finita, ankaŭ la laboro pri organizado de I. K. U. E., tiel grava kaj urĝa, ankoraŭ estos finita antaŭ « Nia Tria »? Mi ne scias! Multe dependos de la kunlaboro de la membroj de la organiza komitato, kiuj dum 8 monatoj povis pripensi la aferon. Do mi atendas la opiniojn, projektojn, proponojn de la komisionanoj kiel eble plej baldaŭ. Se mi, kiel ĝis nun (escepte respondo de Frato ISIDORO en Sept. 1911), ricevos de neniu eĉ ne litereton, ŝajnas al mi neeble, ankaŭ finigi la starigon de plena projekto de I. K. U. E.-organizado antaŭ la Budapeŝta Kongreso. Oni do estas afable petata alsendi siajn opiniojn plej baldaŭ.

*La Prezidanto de la Komisiono  
pri Organizado de I. K. U. E.*

D-ro SMULDERS.

## Kroniko de I. K. U. E.

**Al la estimataj eksterlandaj Geanoj  
de I. K. U. E.!**

L. m. s-ro J. A. KRAL, direktoro de Internacia Literatur-Instituto Katolika en Munĥeno aliĝis al ĉi tiu instituto

*Internacian Oficialan Presoficejon  
de I. K. U. E.*

Li intencas konstante raporti al la ĉefgazetaro tutmonda pri Esperanto kaj la I. K. U. E.

La I. K. U. E.-anaron tutmondan ĉi kune mi petas treege, ke ĝi helpu kiel eble plej energie!

Kunlaborantoj sendu tuj siajn adresojn al la presoficejo mem (*Munĥeno, Germanlando, Herzog-Rudolfsstr. 15.*)

Precipe oni sendu al ĉi tiu oficejo ĉiajn artikolojn pri atakoj gazetaj kontraŭ Eklezio, Religio aŭ Lernejo kaj donu klarigojn pri demandoj, kiujn la presoficejo liksos!

La s-roj Redaktoroj de «*Espero Katolika*», de «*l'Esperantiste Catholique*», de «*Kataluna*», «*Nederlanda*», «*Belga*» kaj «*Hungara Katolika*» estas korege petataj tuj presigi ĉi tiun alvokon!

Korege en Kristo  
samideane,  
R. SCHOLZ.

(Ĉefdelegito de Branĉa Unuiĝo Bavaruja  
de I. K. U. E.)

## Opinio de Protestanta Sciencisto pri la Jezuitoj.

La konata Germana sciencisto D-ro Victor NAUMANN skribis antaŭ nelonge libron, titolitan «*Der Jesuitismus*». Sian juĝon pri la Jezuitordeno tuj ĉi sciencisto resumas jene:

« Mi ne havas tiujn vivprincipojn; mi do ne estas principa amiko de la Jezuitordeno, ankoraŭ malpli de ĝia labormetodo. Tio ĉi tamen ne detenis min de tio, admiri la grandecon de pensado, la potencon de plenumado, la sentimecon kaj konsekvencon en la batalado. Tio ĉi ne detenis min de tio, rekonii la honestecon de konvinkigo de la Jezuitoj. Tamen por alveni al tiu rezultato, mi devis transmarŝi montojn da mensogojn, da falsajoj kaj da hontindaĵoj tra jarcentoj. Mi klopodis esti ĉiam objektiva. Mi kredas ankaŭ prijuĝinta juste la grandajn kaj honestajn kontraŭulojn de la ordeno, kiel CHEMNITZ kaj PASCAL.

« Sed mia malŝatego rigardas la friponojn, la fontfalsantojn, kiuj de post jarcentoj kaj ja ankoraŭ hodiaŭ okupas sin pri tio, proponi honestajn kontraŭulojn, konvinkitajn, piajn, kuraĝajn batalantojn kiel netaŭgulojn, hipokritulojn kaj mensogistojn, kaj kiuj efektive, ke ĝia popolo abomenas ilin, per kio oni malebligas la konfesnan pacon ».

Nu, tiu ĉi juĝo provizore sufiĉu por la  
 ezultmalamantoj !

D-ro S.

## Miksaĵoj el « Espero Katolika ».

### Prego por la Pastroj.

Ho aminda mia Jesu, amanto de l' Pastroj,  
 ĉmetu ĉiutage la kunajn sep donojn de  
 Via Spirito Sankta sur ĉiujn Pastrojn, por  
 ke ili estu ĉio por ĉiuj, en vivado ne sole  
 sed ankaŭ en morto. Paciencon donu al ili  
 kaj la infanetaro aminda, kompaton je la

malsanuloj, humilecon ĉe la mariĉuloj, sen-  
 timecon en kontraŭstarado al tiuj, kiuj per-  
 sekutas vian Eklezion Sanktan. Faru ilin  
 senlacaĵ en instruado, zelaj en konfesprena-  
 do volemaj en disdonado de la Sankta Ko-  
 munio. Por la infero kaj por ĉiuj kunhel-  
 pantoj de Satano estu ili teruraj, alportantaj  
 tamen pacon al ĉiuj bonvolantoj. Kien ajn  
 foriras ili, tien ankaŭ akompanu ilin Via  
 beno, kie ajn ili loĝas, tie regadu ankaŭ  
 via paco; kaj kiun ajn intencas ili beni,  
 tiun benu ankaŭ Vi, ho Dio mia.

Faru ilin apostoloj, faru ilin sanktuloj,  
 Amen.

*Samideanino.*



## RIGARDU LA SANKTAN HOSTION.

Eltiraĵo el letero adresata de Lia Em.  
 Moŝto la Kardinalo Mercier, Ĉefepiskopo  
 de Mehlano al la Pastraro de Lia Eparĥio.

Post kiam la pastro plenumis la ĉefan litur-  
 gian agon, la konsakron, kaj kiam, laŭ la  
 rubriko, li suprenlevas la Sanktan Hostion  
 por igi ĝin tute videbla al la ĉeestantaj kris-  
 tanoj, ĉi tiuj ne restu kliniĝantaj. La su-  
 prenlevado estas farata por ili; diru do al  
 ili ke prave ili humile kliniĝas dum vi, ge-  
 nufleksante, adoras la sanktan Hostion, sed  
 idonu, ke ili devas sekvi spirite, kaj rigarde,  
 la sanktan Hostion unue, kaj poste la kalio-  
 non de la sankta Sango, dum vi ilin supren-  
 levigas super via kapo.

Do, la fideluloj klinas la kapon dum la  
 pastro genufleksas por unua adorado; poste  
 li relevas la kapon, kaj rigardas al la Sank-  
 ta Hostio, kiam la konsakranto elmotras  
 ĝin por ilia adoro. Estas por ili la momento  
 de la alpreĝon de la apostolo Tomaso:  
 « Dominus meus et Deus meus ». Post  
 tio, la fideluloj povas ree klini la kapon  
 dum la dua genuflekso de la konsakranto.

Tiuj samaj ritoj devas esti plenumataj ĉe  
 la konsakro kaj la suprenlevado de la Sank-  
 ta Sango.

el « La vie Diocésaine »  
 Januaro 1908.

### Religiaj Favoroj.

1<sup>o</sup> — Indulgenco je sep jaroj kaj sepfoje  
 « kvardek tagoj » por ĉiu fidelulo kiu, kun  
 fido kaj amo, diros la vortojn, latine au ali-  
 lingve: « Dominus meus et Deus meus »,  
 « Mia Sinjoro kaj mia Dio », rigardante  
 al la Sankta Hostio, kiam la pastro, dum la  
 Sankta Ofero de la Meso, Ĝin suprenlevas,  
 kaj ankaŭ kiam la Sankta Hostio estas mal-  
 kovrata en la Sankta Hostimontrilo sur la  
 Altaro.

2<sup>e</sup> — Plena Indulgenco gajnebla nur unu-  
 foje ĉiun semajnon, por ĉiu kiu plenumos  
 tiun pian agadon ĉiutage dum unu semajno,  
 kondiĉe ke li ricevu la Sanktan Komunian  
 almenaŭ unufoje dum tiu semajno.

« Reskripto de la 18a. de Majo 1907 ».

N. B. — Ni proponas presigi tiujn vortojn de Lia Em. Kardinalo Mercier, aparte, kiel  
 religian folieton. Ke tiuj kiuj dezirus havigi ekzemplerojn por disdoni sin turnu al la  
 direktoro de ĉi tiu Ĵurnalo, S<sup>ro</sup> L. Heidendal en Arendonk. La prezo estos kredeble-  
 1 franko por 50 ekzempleroj.

K. B.

## NOTINDE

La 2-an de Junio 1887 aperis, en Varsovio, la unua broŝuro : « D-ro Esperanto : Lingvo internacia. Antaŭ-parolo kaj plena lernolibro. »

La tutmonda Esperantistaro solene festis la 25-jaran Jubileon de Esperanto la 2-an de Junio 1912.

El la « statistika jarlibro por la prusa ŝtato » ni resumias jenon :

Inter al 37 293 324 loĝantoj estas 62,79% protestantoj. La protestanta loĝantaro kreskis de 1900 ĝis 1905 po 0,30%, la katolika po 0,66%. La naskignombro estas por la katolikoj multe pli granda ol por la protestantoj. Po 1000 naskiĝoj la protestantoj en jaro 1908 havis 530 infanojn, la katolikoj 398 infanojn, kvankam la lastaj nur estas triono de la loĝantaro. La « du-infan-sistemo » kiu pli kaj pli progresadas en protestantaj rondoj, precipe en la grandurboj, klarigas la malprogreson de la naskiĝoj inter la protestantoj. El 1000 edziĝintoj estas jaron 1908 pure protestantaj : 592, pure katolikaj : 299, miksitaj 90,6. La nombro de la miksitaj edziĝoj kreskis de 1900, kiam ĝi estis 75,3 po 1000, ĉiam ĝis 1908. Berlin marŝas antaŭen kun 747,1 miksitaj edziĝoj po milo da edziĝoj ; ĝin sekvas Hessen-Nassau kun 145,2, Schlesien kun 136,3, Rheinland kun 114,6 ; la plej malgrandan nombron da miksitaj edziĝoj montras. 1908, Pommern kun 23,2 po 1000 edziĝoj. El 1000 protestantaj loĝantoj estas, 1900, : 14,73 mikse edziĝintaj ; 1905 : 26,96. La nombro de la protestantoj mikse edziĝintaj do malkreskis, kontraŭe la nombro de la katolikoj mikse edziĝintaj kreskis po 0,44 el milo de la katolika loĝantaro.

### Katolika popola Ligo por Aŭstrujo.

Okaze de la brile okazinta Insbruka katoliktago, en la kristana gazetaro nun la alvoko eksonas pri la aliĝo al la « *katolika popola ligo por Aŭstrujo* », kiu estas la plena portreto aŭstruja de la popolunuiĝo por la katolika Germanujo. Ĝi jam estis fondita aŭtunon 1909 de la centra komitato por Aŭstrujo. Ĝia celado estas : *la instruado, seligado kaj ekzercado de la popolo pri*

*apologiaj, socialaj kaj ekonomiaj demandoj.* Tial ĝi intencas agadi per kunsidoj, flugfolioj, per la sesfoje en jaro aperanta jurnalo « la Popola Ligo », per *konfidviroj* kaj centrejo, ĉe kiu sidas la pezocentro de la ligo ; tiu ĉi estas nome bone organizita sekretario, kiu prizorgadas la aferojn ligajn ; ĝi posedas ampleksan bibliotekon kaj vaste kontruitan registrejon, el kiu la anoj, kiel el plenege armilaro, povas ricevi la spiritaĵajn armilojn. La unuan jaron vasta propagando ne jam estis farita, tial ke la estraro de la popola ligo intencis unue provi ĝian vivpovon ; sed de post kiam, dum tiu ĉi jaro, el ĉiuj flankoj de la imperio, entuziasmaj konsentoj venis, de post kiam miloj aniĝis, oni ne prokrastos plu momenton, kaj tuj komencos la agadon. Ano fariĝas ĉiu ajn, paginte jaran kotizaĵon de almenaŭ unu krono (t. e. unu fr.) ; la anoj ricevas la ligan jurnalon kaj la flugfoliojn senpage ; ili rajtas senpage uzi la socialsciencan kaj apologian bibliotekon de la « Popola Ligo » (du librojn en tri aŭ kvar semajnoj) ; la alsendo fariĝas aŭtrankite kaj eĉ tiel zorge pakite, ke la enpakajo estas uzebla ankaŭ por la resendo. Ĉar la materialo de la registrejo pri socialaj, apologiaj kaj aliaj tag-demandoj ne estas pruntedonata, la anoj povas en la centrejo mem traviidi la materialon kaj fari la necesajn notojn. Kun la centrejo estas ankaŭ kunligita la sociala sciigejo, de kiu oni ricevas senpage sciigon pri ligaj kaj organizadaj aferoj, pri malsan-, malfeliĉ-, maljunec-kaj invalidec-asekuroj, pri impost-, militist-, lu-, hejmaferoj kaj similaj buŝe, aŭ skribe kontraŭ respond-kupono. La centrejo troviĝas en Vieno (Wien), Predigergasse 3. Espereble ankaŭ la sukcesoj de la katolika popola ligo similos tiujn de la popolunuiĝo por la katolika Germanujo.

### La Katolika Eklezio en Usono.

Laŭ la adresaro de la Eklezio Katolika amerikana por 1912 ekzistas nune 15.015.569 katolikoj en la Unuiĝintaj Ŝtatoj t. e. alkresko de 391.808 dum la lasta jaro, kaj de pli ol kvar milionoj dum la lastaj dek jaroj. Ekzistas en la Unuiĝintaj Ŝtatoj 17.491 katolikaj pastroj, el kiuj estas 12.996 sekularaj pastroj. La nombro de la pastroj kreskis la

lastan jaron je 407. Katolikaj preĝejoj ekzistas 13,969. En la Ŝtatoj Newjork, Pennsylvanien, Illinois, Massachusetts, kaj Ohio loĝas la plejmulto da katolikoj. En lastnoma ŝtato ekzistas tri teologiaj seminarioj, en kiuj 249 junaj viroj prepariĝas por la pastra profesio. Ankaŭ ekzistas en tiu ŝtato dek « Colleges » por knaboj, 31 akademioj por knabinoj kaj 370 lernejoj komunumaj, kiujn vizitadas 93.392 infanoj. La sola kristana eklezio de la Ameriko, kiu ĝojiĝas pri orditaj rilatoj, estas la katolika: kaj oni ne eraros, kiam oni supozos, ke la konita elekto de la ĉefepiskopoj al la kardinala indeco rilatas al tio. Ke la Ĉielo progresigu pluan bonfarton de la katolika eklezio de Ameriko!

---

### Frato Izidoro.

La Registaro de la Kedivo de Egipto, por montri sian dankemecon kaj admiron al nia kara Frato Izidoro, la Direktoro de la Reĝa Blindulinstituto en Woluwe apud Bruselo, ĵus nomis lin Oficiro de la « Ordeno de la Medjidie ». Niaj legantoj memoras ke frato Izidoro dum la lasta kongreso en Kairo, proponis ke Esperanto estu enkondukata en ĉiu Instituto por la Blinduloj. La propono estis unuanime akceptata same kiel en Napolo en 1910. Pro tio la kara Frato ricevis dutoje la gratulojn de nia Sankta Patro Pio Xa.

La Redakcio de « Belga Katoliko » ankaŭ

gratulas tutkore la Karan Fraton Izidoro, por la granda honoro al li farita.

..

### Letero de Nia Majstro Dro. Zamenhof.

En la Junia numero de « Pola Esperantisto » aperas gravega letero de nia kara Majstro. Estas granda honoro por ni Katolikoj la fakto ke nia Majstro en sia letero diras ke li ĝin skribis « *por respondi al la invito de la Redaktoro de « Espero Katolika» la Oficiala Organo de I.K.U.E.* La temo de la letero estas Internacia Organizo kaj ni konsilas al niaj legantoj sin turni al la Julia numero de « Espero Katolika » kie ili legos tiun vere majstran leteron.

---

### KOREKTAĴOJ:

En nia lasta numero nia presisto preterlasis multajn erarojn. Ni petas niajn legantojn senkulpigi tiun bedaŭrindaĵon kaj korekti ilin precipe en la grava artikolo de « Kivo-Zoersel » Ekz. linio 15 supre « *enhavas* » devas anstataŭi *entras*, (Tiu lasta igas pensi al la franca « *entraver* », kaj la skribinto diras la kontraŭan). Linio 9 « *memkonscio* » devas anstataŭi *membroj* konscio, kaj « *kulturantaj* » anstataŭ *kultarantaj* « *supermaturigi* » anstataŭ *supernaturigi*.

Tiuj malkorektaĵoj tute sensensigas la frazojn.

L. H.

---

En ĉiuj lokoj de la tuta mondo, mi serĉas gerepresentantojn por disvastigadi. de mi, fabrikitajn Esperantajn Artikolojn, bezonataj al ĉiu persono ; ankaŭ por ne Esperantistoj.

La Artikoloj, samtempe, servas, ankaŭ kiel la plej grava propagandilo por la lingvo Esperanto.

Specimenojn kaj prezarojn en la lingvo Esperanto mi sendas senpage.

Leterojn en ne Esperanta lingvo mi ne akceptas.

A. MIROPOLEKIJ BUDAPEST  
V. Vaczi-ut, 4, (Hungarujo).



### Atentu Geesperantistoj.

La plej efika kuracilo por la tuso kaj ĉiaj malsanoj de la gorĝo, brusto aŭ bronkoj, estas la mondkonataj pasteloj :

## Spa Goudron

haveblaj ĉe multaj apotekistoj kaj *rekte de la elpensinto*, S-ro. Desonay, Spa, Belgujo, en beleta skatoleta je 60 spesdekoj = fr. 1.50.

Abato Richardson skribis al S-ro. Desonay de Bruselo : « Korajn dankojn pro viaj pas- » teloj « SPA GOUDRON ». Dank' al ili mia » bronkita tuso malaperis preskaŭ ensorĉe ».

### Geesperantistoj,

Se vi deziras havigi la plej perfektan Gramofonon, mendu la lastan elpenson, t. e. la Gramofonon sen trumpeto kaj sen pikilo. La safiro de « Pathé » anstataŭas kaj multe superas la malnovan pikilon. Multaj Pastroj, Kolegioj k. t. p. sendas laŭdemajn leterojn al la Fabrikistoj. Petu cirkulerojn de la Société Française des Machines Parlantes, 89, Boulevard Brune, Paris.



# INTERNATIONAL CORRESPONDENCE EXCHANGE.

(I. C. E.)

Monata ĵurnalo enhavanta artikolojn en Esperanto kaj en diversaj lingvoj. Organo por la Interŝanĝo de poŝtnarkoj, kaj korespondado per ĉiuj lingvoj, la Abono = frkj. 2,50 jare. (1 Sm.) Oni sin turnu al la Redakcio: Avenue du Moulin 16, Forest-Bruxelles.

## PROponoj POR INTERKorespondado.

Oni petas la korespondantojn jam cititajn, kiuj ne plu deziras korespondi, tion sciigi al la Redakcio kiel eble plej baldaŭ. Ni nepre altiras la atenton al ĉi tiu avizo.

N. B. Estas devo je honoro respondi al ĉiu korespondanto almenaŭ unufoje.

S<sup>ro</sup> Bernardo M. Serra, C. O. P. de Vilaforta. Vich. Hispanujo.

S<sup>ro</sup> G. Van Oijen, 76, Engelenburgstraat, Den Haag, Nederlando.

Pastro G. Saccardi, Castalpino, Sienna, Italujo.

Pastro Risto M. Popovich-Cupick, Danolovgrad, Montenegro.

S<sup>ro</sup> Methodi Therzianoff, Macedona librejo, Sofia, Bulgarujo.

S<sup>ro</sup> Trajč'e Ĉakarevic, Lyceo Imperia, 302, Uskub, Turkujo.

S<sup>ro</sup> A. B. Seitov, 36, Uĉelnaja Omsk, Azia Rusujo.

S<sup>ro</sup> J. Merino, Berabeŭ, Argentina Respubliko.

La membroj de la Grupo « Zamenhof », sin turni al S<sup>ro</sup> Richardson, 121, Rue du Marais, Bruselo.

La membroj de la Grupo « Antaŭen », sin turni al la Prezidanto S<sup>ro</sup> E. Baez, Montenegro Strato, 13, Bruselo.

Pastro Decoene, Roman Catholic Church, Brandon (Man.) Canada. Povas nur doni adresojn, ne persone korespondi.

S<sup>ino</sup> Doktorino Biske, por la Grupo de Spa, Hôtel de la chaîne d'or. Povas doni multajn adresojn.

La grupo de Basel, Svisujo. Adreso: S<sup>ro</sup> Rusterholz, Prezidanto 22, Marschalkenstrasse.

F<sup>ino</sup> Maud Sewell, Whitehall Cottage, Bishops Stortford, Anglujo.

S<sup>ro</sup> Wallace Mackay, 22, Coniston Avenue, Newcastle-on-Tyne, Anglujo.

S<sup>ro</sup> T. Tchacarevitch, Lycée Imp' Ottoman, Uskul, Turkujo.

S<sup>ro</sup> G. N. Appleton, Lynchburg, Va. United States N. America.

S<sup>ro</sup> Petro Stolk, 32 Waterloostraat, den Haag, Hollande (precipe kun gekatolikoj).

D<sup>ro</sup> Marko Pavloviĉ, reĝa, trib-ĵugisto. Temes var. Hongrie. I. P. K. kaj L.

Rev. P. Primavesi, St. Bridgeis Catholic Church Warrington, Angleterre (li povas doni adresojn).

F<sup>ino</sup> Ina Crafer, 6, Hannover Road, Norwich, Angleterre.

Rev. Pastro Desray, Profesoro, Ancenis France.

Rev. Pastro Dol. Valensole, Basses Alpes France, I. P. K.

F<sup>ino</sup> Anna Köhler, 52 Casselerstrasse, Wolfsanger bei Cassel, Allemagne.

Miss Campell Brown, Olenlosia, S<sup>o</sup> Davids Street Lyttleton, New Zealand, I. P. K.

S<sup>ro</sup> J. L. Stanyan, Montpelier, Vermont Etats Unis, Amerique.

D<sup>ro</sup> H. W. E. Moller, Ruysdaelkade, 21, instruisto.

P. Janssen, Nieuwendijk, 183, korespondisto.

H. Douwes, 1<sup>e</sup> Oosterparkstr., 228, instruisto.

F<sup>ro</sup> C. Kamp, O.-Z. Voorburgwal 167, Kalkulistino.

H. van Dam, Kanaalstraat, 38, Oficisto.

# La Centra katolika Esperanta Oficejo

« ZAMENHOF »

## AREN DONK



Akceptas mendojn por ĉiuj  
Esperantaj libroj.

Vendas Esperantajn verkojn,  
Gramatikojn, lerno kaj legolibrojn  
Esperantistajn insignojn  
k. t. p.

---

### Kelkaj verkoj el la « Librejo »

---

Spirita Juvelaro . . . . .	fr. 2.20
Katolika Preĝaro . . . . .	fr. 2.60
La Kvar Evangelioj . . . . .	fr. 1.60
Hebrea Kalendaro . . . . .	fr. 0.50
Fabiola . . . . .	fr. 3.80

k. t. pl.

---

Adresu ĉiujn mendojn al :

La Centra Katolika Esperanta Oficejo « Zamenhof »  
AREN DONK

## LIBREJOJ Esperantistaj

---

A. J. Witteryck, Presisto-Eldonisto, Brugge.  
Spineux & C<sup>o</sup> Rue du Bois Sauvage, Bruxelles.  
Belga Esperanta Oficejo, Vondelstraat, 20, Antwerpen.  
Franca Esperanta Oficejo, Rue d'Angoulême, 20. Paris.  
A. N. Govers, Westeinde, 6, Den Haag.

---

## HOTELOJ

---

COURTRAI : « Hôtel du Nord » Je la stacidomo, Kunvenejo por Esperantistoj.

---

Au Moulin d'or, Rue d'Assaut, Bruxelles. Esperanta Kunvenejo.  
Hôtel Louis Le Grand 2, Rue Louis le Grand, Paris. En belega loko,  
apud avenue de l'opéra.

Hôtel Métropole, Brussel.

La plejgranda hotelo en Belgujo, 500 ĉambroj kaj 150 ĉambraroj kun banejoj.

**Oni parolas Esperante.**

---

LONDONO : Tre rekomendinda kaj komforta, vere « ESPERANTA-HEJMO ». Sinjorino O' Connor « Esperante House », 17, St. Stephens Square. Bayswater, London, W. Tre moderaj prezoj.

---

---

## Rekomendindaj Firmoj

---

Sinjoro Leo DE COENE-HAUTEKEETE, Rue Savary, Courtrai.  
Fadenoj — Stupoj — Kotonoj spinataj k. t. pl. — Oni parolas Esperanton.

Notariejo de Sinjoro BOSSAERT, Courtrai.

Pension-Lernejo por Fraŭlinoj. « Les Dames de Saint-Nicolas » Courtrai kaj Dixmude. Oni petu prospekton al la Respektinda Superulino.

Strumpajoj : ESPERANTISTOJ, aĉetu ĉiam ĉe la bonkonata firmo Soj. MATHIEUX kaj Filoj : 49, Marché aux Poulets, BRUSELO. Delegito por Belgujo de U. E. A.

Sinjoro VERHAUT, Presisto en Courtrai.